

Em. Jaegemaijan, 37, Brussel (Belg.)

Ejo \* Brogbeo \*

Flandra Esperantista

\*N.B.

# FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA

ESPERANTO

MOVADO

Officieel Orgaan  
van den

Vlaamschen  
Esperantisten -  
Bond



# Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

## EL LA PREZARO:

La Viro el Francujo — Ivans	29,—	bind
Gösta Berling — S. Lagerlöf	55,—	»
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,—	»
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,—	»
Ŝi — H. Rider Haggard	29,—	»
Petrolo, vol. 1 — U. Sinclair	29,—	»
Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair	29,—	»
Luno de Izrael	29,—	»
La Dormanto Vekiĝas	29,—	»
Pallieter — F. Timmermans	28,—	»
La Leono de Flandrujo — H. Conscience	32,—	»
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	broŝ.
La Du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,—	»
La Homaj rasoj de la Mondo	24,—	»
Kudlago, la malgranda eskimo	5,—	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,—	»
Stranga Butiko. — R. Schwartz	10,—	»
Maria kaj la Grupo. (L.M.-Libro)	22,—	»
Konversacia Literaturo (Cseh-metoda)	12,—	»
Fundamenta Krestomatio — Zamenhof	20,—	»
Nieuw Leerboek (geïllustreerd)	12,—	»
Examenopgaven	10,—	»
Muusses E-Biblioteko (10 volumetoj)	41,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,—	»
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50	»
Schidlof Zakwoordenboek	25,—	bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,—	bind
Beknopt Woordenboek Van Straaten	40,—	bind
Plena Vortaro de Esperanto	84,—	bind
Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,—	broŝ.
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n <sup>o</sup> 1)	10,—	»

**INSIGNOJ:** Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 3.— fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Flandra kaj Esperanta flagetoj: 5.— fr.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1.— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3.— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

# Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista  
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:

A. Pittoors  
Ten Eeckhovelei, 125  
Deurne-Noord  
Antwerpen



Administranto:

Adolf De Keyzer  
P. van Humbeekstr., 3  
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj

Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj

Poŝtêko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

## Kunveno de Flandra Ligo Esperantista

Ligkunveno okazos dimanĉon la 26-an de Septembro, je la 10-a matene, en la ejo « Elckerlijck », 3, Korte Kruisstraat, Gent.

Tagordo:

1. Priparolo de la jarraporto.
2. La kursoj.
3. La instituto.
4. Grupkonsilanto.
5. Reelekto de la estraro.
6. Financa raporto pri nia 8-a kongreso.
7. Diversaĵoj.

Difino de la loko de nia 9-a kongreso.

Ni atentigas la sekciojn, ke ili havas la nepran devon sin reprezenti per oficiala delegito, niaj lokaj reprezentantoj estas bonvenaj.

Posttagmeze ni vizitos la Beginejo.

N. B. La estraro kunvenu je la 9-a.

LA ESTRARO.

# Esperanto in de Praktijk.

## BELGIE

Bij de talrijke weekbladen en tijdschriften waarop de stedelijke bibliotheek der stad Leuven geabonneerd is, komt zich nu ook het Esperanto-weekblad « Heroldo de Esperanto » te voegen.

## BRAZILIE

« Het gouden jubileum van Esperanto een historisch feit », aldus de minister van Verkeer en Openbare Werken. Een speciale postzegel zal uitgegeven worden om het 50-jarig bestaan der internationale taal te herdenken.

Ter gelegenheid der 10de internationale handelsfoor van Rio de Janeiro werden aanplakbrieven uitgegeven (70x45 cm.) met tekst in de voornaamste talen waaronder Esperanto. Zendt een geïllustreerde postkaart aan « Diretoria de Turismo e Propagando, Avenida da Nações, Rio de Janeiro — Brazilo » voor toezending der Esperanto-kaart.

## FRANKRIJK

Tijdens den duur der wereldtentoonstelling te Parijs, gebruikt het Postkantoor « Parijs 8, rue de la Boétie » een esperanto-stempel voor het stempelen der brieven en postkaarten.

## HONGARIJE

De esperanto-stand op de internationale handelsfoor te Budapest, werd buiten een groot aantal binnen- en buitenlandsche bezoekers, ook bezocht door esperantisten-handelaars uit 8 verschillende landen.

## NEDERLAND

Naar het voorbeeld van Brazilië, Oostenrijk, Hongarije en Liechtenstein, heeft nu ook het Nederlandsch postbeheer een reeks van 24 geïllustreerde postkaarten uitgegeven met verklarenden tekst in het Nederlandsch en Esperanto.

De Heer Directeur-Generaal Damme heeft het plan voorop gezet bij een nieuwe uitgave der internationale antwoord-coupons, den tekst ook in Esperanto te doen drukken.

## POLEN

Door het bestuur van het kuuroord Krynica werd een prospectus in Esperanto uitgegeven. Gratis verkrijgbaar bij « Direkcio de Kuracejo (Ing. Leono Nowotarski) in Krynica — Polen.

## TCHECO-SLOWAKIJE

Radio Brno, reeds genoegzaam bekend onder de esperantisten-luisteraars om zijn hoogstaande radio-uitzendingen in Esperanto, heeft een speciaal almanak uitgegeven. Een modern en smaakvol versierd boek, met waardevolle artikelen, versierd met tientallen illustraties.

Ook hier heeft het Postbeheer geïllustreerde postkaarten uitgegeven met tekst in het Tchech en Esperanto.

Ter gelegenheid van het 10de kongres der Sokols in 1938 te Praag heeft deze vereeniging een aanplakbrief uitgegeven in Esperanto. Inlichtingen en aanplakbrieven bij Ceskoslovenska Obec Sokolska « Tyršuv Dum » Praha III — Ceĥoslovakio.

## Koresponda kurso

Ĉiujare estas centoj da personoj kiuj, pro diversaj kialoj, ne povas ĉeesti kurson, sed tamen deziras lerni Esperanton. Ankaŭ por ili ni devas zorgi. En kunlaboro kun la « Juna Vivo » ni ellaboris la planon organizi korespondan kurson.

Jen la regularo:

La Kursa Centro eldonas libretojn kun 10 karto; ĉiu karto kostas 12.50 fr. Ĉiu esperantisto povas ricevi unu aŭ plurajn de tiuj libretoj, sed nur pagos 8 kartojn. Do, kiu vendas tutan libreton gajnas 2 kartojn, aŭ 25 fr.

La aĉetontoj sendu la karton al la Kursa Centro, kaj tuj ili ricevos la lernolibreton kaj la klarigojn por la unuaj 4 lecionoj. Unu monato poste 4 sekvantajn lecionojn, k.e., ĝis entute 15 lecionoj.

La lernontoj ensendu siajn taskojn, ĉu ĉiusemajne, ĉu ĉiumonate (4 samtempe). Se ili aldonas la necesan poŝtmarkon (0,70 fr.) ni resendos la taskojn post korektado.

La kurso finiĝu plej malfrue je la fino de Majo.

Krom la jam menciita profito de 2 karto estas la jenaj avantaĝoj:

1. Certan kvanton da premioj (libroj aŭ abonoj) ni forlotumos inter la lernontoj kiuj regule ensendos siajn taskojn.

2. Se ni atingos 1000 gelernantojn, ni forlotumos inter la propagandistoj, senpagan dusemajnan vojaĝon al Svisujo kun internacia esperantista karavano.

En tiu loterio ĉiu partoprenonto havos tiom da ŝancoj kiom li vendis kartojn.

Se la gajnonto ne deziras aŭ ne povas partopreni la vojaĝon, li rajtos ricevi la prezon de la vojaĝo ((800 fr.).

Ni esperas ke ĉiuj ligoj laboru por sukcesigi la korespondan kurson. Ne forgesu ke ĝi precipe celas atingi la personojn kiuj pro iu aŭ alia kaŭzo ne povas ĉeesti buŝan kurson. Do, prefere laboru en lokoj kie kurso ne okazos. Sekcioj, instigu viajn gemembrojn.

Mendojn, kaj indikojn demandu al Kursa Centro — Hombeek-sche steenweg, 54, Mechelen.

## Antverpeno invitas vin

Antverpeno, la urbo de Rubens; Antverpeno kaj la majesta staturo de la Katedralo; Antverpeno kien la Skeldo kolektigas internacian ŝiparon; Antverpeno invitas vin.

Okaze de la septembra regiona kunveno, la Flandrema Grupo Esperantista organizas dutagan feston: sabaton la 18-an kaj dimanĉon la 19-an, diversaj kaj surprizaj distraĵoj atendas vin. —

La mirinda tehniko parto de la tuneloj, la panoramo de sur la « Tura Konstruaĵo », vizito de la haveno per boato estas kelkaj punktoj de la programo. La vetero estos suna, somera: tion ni prizorgos. Ni menciuj ankoraŭ balon, dum kiu muziko, kantoj, teatro kaj dancado estos sur la tagordo.

Aldonu fine taŭgan loĝadon, malmultekostajn manĝojn: ĉu vi povus deziri kaj imagi pli?

Notu do la daton : 18-19 Sept. : tiujn tagojn jam de nun ne plu estas liberaj por aliaj okupoj.

Bonvolu skribi tuj, ĉar urĝas al la Sekretariejo de la Grupo : Stefaniestr., 44, Antverpeno.

## Leuven - Grava Esperanto-Ekspozicio

Kiel preparo al la kurso kiu komencos en Oktobro sekvonta, la lovena sekcio « La Nova Tagiĝo », aranĝos Esperanto-Ekspozicion. Tiu Ekspozicio estos unu el la plej gravaj kiuj jam okazis ĉe ni. La Lovena Urbeŝtaro ĝis nun jam ĉiam montris sian intereson al Esperanto: ĝi nun donis plej grandan probon. Ĝi nome *senpage* disponigis al ni la grandan suban salonon de la Akademio de Belaj Artoj plej grava, ĝi troviĝas survoje de la kermeso-placo kiu ĵus tiam okazas.

La Ekspozicio okazos

DE LA 18-AN ĜIS LA 20-AN DE SEPTEMBRO.

Sed tio ne estas la nura intereso de la ekspozicio ! En la ejo de la Ekspozicio funkcios SPECIALA POSTOFICEJO. Ĉiuj poŝt-sendaĵoj poŝtitaj en la speciala leterkesto estos ŝtampitaj per speciala ŝtampilo tekstante: « Leuven — (dato) — Ekspozicio de Esperanto ». Ĉiu komprenos kiel grava tio-ĉio estas por la propagando en nia lasta kongres-urbo.

La organiza Komitato, por kontraŭigi la elspezojn de propagando ktp., decidis eldoni du specialajn poŝtkartojn. Ili estos frankitaj per poŝtmarko de 0,35 fr. kaj estos ŝtampitaj per la speciala ŝtampilo. La prezo estas 1 fr. po karto. La unua karto estos nur liverita al tiuj kiuj mendas ĝin antaŭ la 14-an de Septembro la dua estos ricevebla en la ekspozicio, sed estos ankaŭ aĉetebla per antaŭa mendo. Ĉiu Esperantisto nature ŝatos posedi tiujn du kartojn kiuj montras la oficialan intereson por Esperanto : Ili do mendu la kartojn, kun antaŭpago, al la sekretario de la grupo : Lode Cnops, Broekstraat, 21, Heverlee.

Venu multnombre al Leuven por viziti la Ekspozicion!

## La Flandraj verkistoj kaj la Flandra popolo

door A. BRYNS.

La Flandra popolo estas batalanta popolo. Depost 1830 ĝi estas subpremata de ĉiuj centralizantaj registaroj de Bruselo, ne nur en lingvaj aferoj, ankaŭ rilate promociojn en publikaj oficoj; ĝiajn naturajn riĉaĵojn, minojn, industriojn, komercon, bankojn grandparte posedas popolfremduloj, estas administrataj de kontraŭ-flandraj direktoroj kaj konsilantaroj.

La flandra popolo estas vivplena energia popolo. Jam dum pli ol jarcento ĝi daŭre kontraŭstaras la ĉiam novajn klopodojn por subpremi, por perforti ĝin, asimili ĝin al la francaj lingvo kaj spirito, ĉar tiuj klopodoj estas multaj kaj diversaj laŭ periodo kaj cirkonstancoj : publika, impertinenta, mistera kaj mallojala, atakanta, alloga kaj flata.



LITERATURA MONDO  
nia sola literatura gazeto  
Kunlaboras ĉiuj gravaj  
E-verkistoj.

La plej detalajn kaj ob-  
jektivajn librokritikojn  
vi trovas en

LINGVO-LIBRO

kvaronjara aldono al Lit.  
Mondo.

Abonojn akceptas kaj spe-  
cimenojn sendas :

**Flandra Esperanto-Instituto**

Magdalenast., 29, Kortrijk (P.K. 326851)



*En monato septembro  
Ekferoras grupmembro.  
Amindumas, aklamas,  
Ĉu la legi li amas?  
Tio, dum liaj amuroj  
Malsategas la Murroj?  
Ĉe la legi ne amas  
La fervoro ja lamas*

La flandra popolo havas grandan amon por sia propra lando, por Flandro-lando, kaj energie defendas sian propran lingvon malgraŭ portortagado kaj allogo.

Tiu amo por propra lingvo, por propra tero, por propra natur — kaj urbbeleco, por propra historio, por moroj kaj kutimoj : ĉi-ĉio estas la praforto de la defendo (la jarcentdaŭra defendo, diras iuj histori-sciencistoj) kontraŭ la fremda subpremado kaj degenerigado. Tiu amo, tiu defendo, tiu ribelo, tiu batalado kaj batalemo ĝis nuntempe respoguliĝas en la literaturo de Flandrujo.

Ekzistas rimarkinda, daŭra interŝanĝado inter la Flandra popolo kaj ĝiaj literaturistoj kiel ankaŭ la plej bonaj komponistoj en Flandrujo ĉiam intense vivis kaj vivas kun sia popolo.

La feliĉo kaj veo de Flandrujo, bildoj el ĝia historio, la batalo kaj morto aŭ la venko de ĝiaj herooj, la triumfoj kaj malvenkoj de la Flandroj, la amo por ĝia lingvo kaj ĝia popolo, por ĝia ĉielo kaj kamparoj, por ĝiaj dunoj, riveroj, por ĝiaj urboj kaj ĝiaj turoj, ĉi-ĉio vivos en la kanto en la bona kaj malbona poemo, en la bona kaj malbona prozaĵo de la flandraj verkistoj.

Ankaŭ dum sia malgajemeco la flandra aŭtoro sin fiksas al sia lando. Flandrujo lin servis tiel dum lia plej pesimista humorstato, dum lia melankolio kaj senkuraĝemo, kiel dum ĝojo kaj aroganteco; li uzas Flandrujon por elkanti kaj diri propran ĉagrenon kaj propran ĝojon; kiel ankaŭ por senhezite vipi per ĝi; ĉio neperebla amo por lando kaj popolo.

« Reinaert » kaj « Uilenspiegël » vivas en li, samkiel la herooj de la Orsprona-batalo, kaj Artevelde, kaj Oranje kaj Aldegonde : gajemeco kaj dramo, tragiko kaj ŝerco, kaj humoro kaj satiro, el propra historio pri propra popolkaraktero montriĝas en lia verko.

La Flandra Literaturo estas nacia, eĉ nekonscie, sed ne ŝovinista. Se ni trarigardas la registron de la Flandraj Verkistoj ek de 1830, ni

ĉiam retrovas tiun specialan flandran emon en la verkaĵoj de la longa serio da poetoj aŭ rimaĉantoj, de prozaĵistoj aŭ prozaĉistoj.

De Conscience oni diras ke li lernis legi sian popolon. « La Flandra Leono », (lian ĉefverkon) oni legis, oni prezentis teatre, surstrate la infanoj ludas rolojn el tiu romano; la libro estas en ĉiu biblioteko, en ĉiu lernejo, preskaŭ en ĉiu hejmo. Neniu en Flandrujo ne konas tiun verkon, kaj ankaŭ nun post tiom da jaroj, oni nur trovas malmultajn, kiuj ne scius kiu kaj kio la « Leono de Flandrujo » estas, kiu Conscience estis. Duoblan sukceson akiris tiu libro: Flandra-nacian kaj literaturan. Finfine ne estas eble disigi tiujn du sukcesojn, ĉar la epopea rakonto el la fama Flandra pasinteco ektuŝis la flandrajn animojn: ĉiu volis ĝin legi kaj relegi. La popolo estas trovinta la vojon al propra literatura lingvo. El tiu popolo mem venis la verkistoj, bonaj, kaj malpli bonaj. Ili konis la bezonojn kaj ĝojojn de Flandrujo, la koron kaj la spiriton de sia lando, la dezirojn, la petojn, la aspirojn, la morojn kaj kutimojn, la vivon de siaj kunhomoj sur propra tero, en urbo kaj vilaĝo.

La kelkaj flandraj aŭtoroj de pli riĉa deveno ol siaj gekolegoj en la literaturo ankoraŭ ne forkuri povis el tiu speciale flandra ĉirkaŭaĵo. Eĉ la aristokrata poeto kiu konscie aŭ nekonscie restas for el la komuneco dum pli ol unu momento sentas inspiron envortigi per versoj de granda beleco sian profundan amon por Flandrolando.

Ekzistis kaj ekzistas kontakto inter la flandra verkisto kaj liaj legantoj ĉu pri poemo, ĉu pri prozo, ĉu pri teatraĵo. Ankaŭ tiuj, kiuj volas skribi per internacia plumo kaj efektive transiras la proprajn landlimojn kaj kreas ĝeneralajn, homajn animstatojn kaj agojn, tamen ne sin forigi povas de la amo por, el la altiro al Flandrujo. Feliĉe mi volus diri.

La FONTO restas flandra.

La plej bonaj flandraj verkistoj ĉerpas el la videbla, tuŝebla kaj aŭdebla de la propra regiono, de la popolo, priaŭskultas la korfrapon, travidas la animon de homoj de ili konataj.

La flandra leganto rekonas en tiuj verkoj sian landon sian ĉirkaŭaĵon, siajn konatulojn, sian popolon, sin mem. Li ĝojkantas kune kun la verkisto, estas seniluziigita, malgaja, gaja, laŭtĝoja, ribela kune kun sia popolo rilate al la artproduktaj personoj, medio, agado, sed preskaŭ ĉiuj rekte, t.e. persone, kunvivas kun siaj kunhomoj, kaj partoprenas la bonon kaj la veon, kaj ĉiuj ludas rolon en la batalo por la libereco de Flandrujo, ĉu persone kunlaborante, ĉu en aŭ pere de siaj literaturajoj.

Ili devas plenumi por sia popolo kulturen rolon en la plej larĝa senco de la vorto: politika, socia, literatura. Ili tion ja faras kiel plenkonsciaj flandroj; en iliaj skribaĵoj kaj flanke de tiuj skribaĵoj per vorto kaj per agoj.

Pro tio ekzistas en Flandrujo interna kunvivado de lernejo kaj popolo kun la verkistoj, je multaj okazoj eĉ de person'al persono.

La Flandra literaturo estas la enhavo de Flandrujo mem, de Flandrujo en ĝia tuteco kaj en ĝia diverseco.

Oni ja tiom parolas pri Eŭropaneco en literaturo kaj politiko.



Ni esperas-kaj ni ĉiam klopodis por tio, ke la rigardo de la homoj tru malproksimen preter la vilaĝ-kaj landlimoj, ke neniu popolo sin mem priŝatas kiel elektita, ke la mallarĝa ŝovinismo foriĝu el politiko kaj arto, ke la eŭropa spirito — en la sana senco — alvenu super ni.

Ni diras en la sana senco.

Car ni ne povas pensi pri tutegaligeco.

Ni devas akiri: konscion pri la « Esenco » de ĉiu popolo. La nacia ne eksigas la internacian : ĝi estas la plej bona vojo al ĝi.

Popolo devas iĝi nacie sana en si mem por povi okupi indan lokon en la mondo, kaj kunlabori al la ĝenerala evoluo laŭ ĉiu vidpunkto.

La Flandra popolo trapasas tiun periodon de nacia sanigado. Tio respeguliĝas en ĉiuj spiritaj aspektoj de Flandrujo. Ke ni ĉiam konstatas restojn de tiu ĉi ega kaj longa malsano estas kompreneble. Ĝia vivoŝto kaj vivenergio fariĝas ĝin senmorta ; sed ĝi ricevis tiom da frapadoj, tiel teruraj, ke tute ne mirige estas ke la resaniĝo ne jam tute efektiviĝis.

Ankaŭ ne en la literaturo.

Ankaŭ ne per la literaturo.

La flandraj verkistoj sciis krei atmosferon, ĉar ili prenis el propra lando, el propraj homoj : ilia verko ne estas abstrakta, ilia verko vivas.

La epopeo, la liriko, la romano, la novelo, la teatraĵo estas trapentrintaj en Flandrujo.

Tamen, oni ne opiniu ke Flandrujo vivas en mallarĝa rondeto. Male : ju pli venkas la memkonscio, ju pli antaŭeniras la ideo pri memstareco, ju pli la flandra konscio pli profunde radikas en la animoj, despli disvolviĝas ĝia kulturo, despli plilarĝiĝas la landlimoj kaj alvenas la sanaj, freŝaj ventoj de ĉiuj flankoj.

Flandrujo ne estas hermete fermita por la Eŭropaj kaj mondaj problemoj kaj infuoj. Tio povis esti vera — amenaŭ por la plej granda parto de la loĝantaro — tiel longatempe ke la luktado por la savado kaj la vivo de Flandrujo, ne jam ĉiujn kuntrenis. Sed nun, kiam ĉiuj estas kunligitaj al tiu batalado, kiam laboristo kaj kamparano kaj burĝo kaj oficisto kaj intelektulo efektive estas kuntrenataj en tiu luktado, kaj scias pri kio temas, la ĝenerala kulturo tie atingis multe pli altan nivelon : per la nacia al la sana internacia.

La Flandraj literaturistoj okupas gigantan parton en la popolkonsciigado kaj en la kondukado al la kulturo; ankaŭ ili, kiuj nek perparoladoj, nek per batalskribaĵoj iris Flandrujon. Ili atingis kaj atingas tiun konsciigadon kaj kulturdisvolvigan parton per sia flandra, sia nacia beletristika laboro.

La Flandra literaturo, kune kun la Flandra scienco kaj la Flandra politiko plenumas tiun ĉi historian rolon : ili animigas kaj subtenegas la Flandran naciemecon !

Tradukis Pol VAN DER POEL.

## Meeningen over Esperanto

BORJE BRILIOTH, Dr. in de wijsbegeerte, hoofd van de internationale gazetdienst in Zweden, schrijft: Voor hem die evenals schrijver dezes een groot deel van hun leven hebben besteed aan een middel tot het onderling verstaan tusschen de volkeren, is het een ware vreugde in de gelegenheid te zijn, zijn oordeel uit te drukken hetgeen Esperanto en de Esperantisten hebben bijgedragen tot dit hooge doel.

Niets hindert meer het broederlijk gevoelen en samenwerking tusschen de verschillende volkeren dan de taalmoeilijkheden. Het is juist dat gevoel van taalverschil, hetwelk Esperanto op 'n grootsche manier op weg is van te doen verdwijnen. Esperanto smeedt al meer en meer klare en sterke schakels tusschen de volkeren en de volkszielen. Deze, hare hooge taak schijnt op 'n opvallende manier de Esperantisten te beïnvloeden. Meermalen heb ik in verschillende plaatsen van de wereld opgemerkt hoe de leden van deze broederschap aanstonds als oude vrienden met elkander omgingen, hoe zij alles in het werk stelden elkander van dienst te zijn en hoe zij met een ware geloofszekerheid hunne zaak verdedigden en nieuwe volgelingen trachten te winnen. De kleine groene ster in het knoopsgat is het teeken en de talisman van deze broederschap, hetwelk harten zal openen en in geen geval nationaliteit, ras of maatschappelijke positie in aanmerking neemt. Het is het ware symbool van een internationale volksgemeenschap.

Bij mijn werk als leider van de Zweedsche-internationale-gazetdienst te Stockholm heb ik met vreugde de offervaardigheid waargenomen die Esperanto aan zijn beoefenaars schijnt te geven. De taak van mijn dienst is het verspreiden, doen kennen en de genegenheid op te wekken voor mijn land door middel van de wereldpers.

Om dit werk nog te versterken verzocht ik Esperantisten in Zweden en andere landen om ons gazetmateriaal te verspreiden. Het resultaat is, dat dank aan de onbaatzuchtigheid en *niet betaalde* arbeid van een groot aantal Esperantisten ons inlichtingsmateriaal nu in het Esperanto verzonden wordt naar dertig verschillende landen en deze berichten meermalen in hunne dagbladen doen verschijnen. Een voortreffelijk Zweedsch Esperantist vertaalt de wekelijksche artikelen zonder de minste vergoeding, een andere controleert het materiaal dat verzonden wordt. Ongeveer 70 Esperantisten over de gansche wereld ontvangen dit rechtstreeks uit ons bureel, vertalen het in hunne respektievelijke talen en werken mede om deze in de dagbladen van hun land te doen verschijnen.

Kan men een beter bewijs geven van den geest van onbaatzuchtige dienstwilligheid en idealistische geestdrift welke tusschen de Esperantisten van de gansche wereld heerscht. Met dankbaarheid en bewondering druk ik hier mijne overtuiging uit dat ESPERANTO één van de doeltreffendste en veelbelovende middelen is om het licht te verspreiden in het volksche gemeenschapsgevoelen in deze op het oogenblik donkere, hoosaardige en wankelende wereld.

Vertaald uit het Esperanto door JEVA.

## Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

# WAAROM ESPERANTO

?

door E. CORTVRIENDT.

*Uitgave van het Vlaamsch Esperanto Instituut te Kortrijk,  
formaat 12ĉ18, 24 blz. Prijs : 1 frank.*

Dikwijls is gevraagd geworden — in de laatste tijd — naar eene goedkoope propaganda-brochure over Esperanto.

Hier wordt een boekje aangeboden dat aan de gestelde eischen voldoet en zekerlijk veel zal medehelpen tot het bekendmaken van Esperanto.

De verscheidenheid der 11 hoofdstukken maakt de inhoud aantrekkelijk ook voor wie reeds bekend is met de Esperanto-beweging. Voor alle propagandisten is het boekje onmisbaar, want het verschaft hen een uitgebreid overzicht over het probleem der wereld-hulptaal, zooals blijkt uit hiernavolgende titels: *Waarom een internationale taal? Waarom een neutrale hulptaal? Uit de geschiedenis der wereldtaal. Ontstaan van Esperanto. Structuur van het Esperanto. De Esperanto-grammatika in één oogopslag. Verbreiding der internationale taal. Esperanto en de nationale talen. De Esperanto-literatuur en de Esperantopers. Esperanto in het practisch leven. De georganiseerde Esperanto-beweging en de Vlaamsche Esperantisten Bond*

De brochure bevat eene foto van Dr. Zamenhof en is keurig uitgegeven; ongetwijfeld zal haar in Vlaanderen een goed onthaal te beurt vallen.

Aan samideano Cortvriendt onze beste gelukwensen voor zijn eerste werkje dat ook de eerste propagandistische uitgave is onzer eigen organisatie.

« LA MALGRANDA MONDO ». *Lernolibreto por infanoj, verkita de Annie Rebers kaj ilustrita de T. Langeberg. Ĝi estas la unua volumeto de serio de tri, kiuj aperos sub la komuna titolo « Nia Mondo ».* Grandformate, 48 paĝoj, presita sur bona papero kaj kun forta kovrilo, prezo 30 cendoj au 3 internaciaj respondkunponoj. Havebla ĉe Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la Nederlanda lingvo. Posibus 0.50. Amsterdam O. Postgiro 111278. — La le-

cionoj jam aperis en la monata gazeto « La Vojo ». Ĝi taŭgas ne nur por infanoj sed ankaŭ ni povas instigi la instruistojn uzi tiun verkon por la instruado de plenkreskuloj aŭ almenaŭ trarigardi ĝin antaŭ ol komenci kurson, ĉar certe ili trovos novajn metodojn por klarigi kelkajn punktojn de la gramatiko, tiamaniere ke ili estas facile kompreneblaj por personoj kiuj de longe forlasis la lernejon. Ni atendas la sekvontajn eldonaĵojn kiuj kompletigos la kurson kaj sendube estos tiel interesaj kiel ĉi-tiu unua libreto. Unuvorte, ni varme rekomendas la libron.

H. V. D.

## Por komencantoj

MALLONGA RAKONTO EL GAZETO.

Iam inĝeniero devis konstrui fervojon en Sud Ameriko. Li volis komprenigi al la nigraj homoj ke la lokomotivo helpas ilin por transporti ĉiujn al malproksima urbo. La inĝeniero demandis la ĉefnegron: « Kiom da tagoj vi bezonas por iri al la plej proksima urbo? » — « Oni bezonas tri tagojn por iri kaj reveni » respondis la nigro. — « Estas tro multe » respondis la inĝeniero, « Per la fervojo oni iras kaj revenas en unu tago. » — « Estas tro rapide » respondis la ĉefnegro, « Kion faros tiam la negroj dum la du aliaj tagoj? »

Tradukita de Sinjoro E. MOREL, Vilvoorde.

LA SIMI DINO, LA SIMIO KAJ LA NUKSO.

Juna simiidino ŝirkolektis nukson kiu estis ankoraŭ verda. Ŝi metis la denton en ĝi, faris grimacon kaj forĵetis ĝin.

— « Mia patrino mensogis », ŝi diris, « certigante min ke la nuksoj estas bonaj! »

Simio levprenis la nukson. Li rompis ĝin inter du ŝtonoj, senŝeligis ĝin kaj tiam manĝis ĝin. « Via patrino pravis, mia karulino, la nuksoj treege bongustas, sed oni devas malfermi ilin.

Laŭ Florian. Tradukita de Sinjorino L. GERARD, Bruselo.

## Diversaĵoj

Depost jaroj ekzistas en la malliberejo (por junuloj) de Hoogstraten Flandra studrondo, kiu estas filio de la kaptitunuigo « Rompitaĵoj ». Antaŭ kelka tempo aŭtodidakta esperantisto parolis tie pri Esperanto kaj akiris grandan sukceson. Multe da junuloj deziras nun lerni Esperanton sed ili ne havas monon, nek la okazon por aĉeti la necesajn lernolibrojn. Tial ili petas la pli feliĉajn samideanojn alsendi malnovajn lerno — kaj legolibrojn, broŝurojn, k.t.p., laŭ jena adreso: Vlaamsche Studiekring, Stafschool te Hoogstraten.

\* \* \*

La UABO (Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj) eldonis ĝeneralan adresaron por la jaro 1937, kiu enhavas entute 1624 nomojn el 38 landoj. UABO petegas ĉiujn vidantajn gesamideanojn efike helpi ĝin en la penado esperantigi multe da nevidantoj en ĉiuj landoj. Informoj petu de la sekretario de UABO, Sro Harald Thilander, Stocksund. Svedujo.

\* \* \*

La tria konkurso organizita de Radio-Roma antaŭ kelkaj monatoj donis jenan rezultaton : Verkoj ricevitaj en lingvoj franca 209, germana 163, esperanto 101, angla 68, nederlanda 61. Esperanto sur la tria loko, antaŭ la angla. Gojiga fakto !

ATENTU !

\* \* \*

Koresponda centro internacia havigas ĉiaspecajn korespondadrajsojn ebligas korespondadon pri ĉiuj temoj kaj ĉiuj landoj. Petu Detalojn 2e Helmerstraat, 22, Amsterdamo.

## Gratuloj

ANTWERPEN. — Al la frato de nia vicprezidantino, So Alois Van der Mast, ĉefgvidanto de la esperantistaj skoltoj, kiu edziĝis kun Fino Ph. Permeke, Flandrema Grupo Esperantista esprimas siajn plej korajn gratulojn kaj bondezirojn.

\* \* \*

OUDENAARDE. — La simpatia prezidanto de la loka grupo « AL PACO » Sro Leopold Boon edziĝis kun Fino M. Szöcs.

\* \* \*

ANZEGEM. — La kasisto de la tutnova grupo « La juna Espero » Sro Gilbert Devos edziĝis kun Fino J. De Reijke, ambaŭ el Anzegem.

Ni tutkore deziras multan feliĉon al ambaŭ paroj, dum ilia nova vivo.

## Grupa Vivo

### AALST. PIONIRO.

La fidelaj Pioniranoj ankoraŭ regule kunvenas en « De Koornbloem » Granda Placo. Sro Neirinck, anc de nia grupo, surprizigis nin la 5an de Aŭgusto per interesa parolado pri sia vojaĝo en Norvegujo kaj Svedujo kie Ĥ konatiĝas kun afablaj kaj servemaj samideanoj.

### ANTVERPENO. FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Verŝajne pro la libertempo, multaj membroj ne venis al niaj semajnaj kunvenoj : ili tamen ĉeestis « spirite » pere de poŝtkartoj senditaj de proksime kaj de malproksime. Kuraĝaj, kiel kutime, la « Flandremuloj » ekskursis bicikle al Hofstade, al Arendonk, kie okazis la Aŭgusta regiona kunveno : la vizito de la Abatejo de Postel interesis ĉiujn.

Krom la ĉiam grava propaganda-problemo, precipe staris je la tagordo la venonta regiona kunsido (18-19 de Sept.) ; escepte ĝi estos ĉutaga kaj do pli ekzakte nomiĝos « Esperantaj Tagoj ».

Aranĝi taŭgan programon, zorge pristudi ĉiujn detalojn kaj ĉefe pretigi amuzan teatraĵeton postulas multan tempon kaj laboron. Devas iĝi beĵa tago por nia idealo : ni atendas multajn grupojn kaj gesamideanojn. En cirkulero kaj eble aliloke en la revuo ili trovos la necesajn informojn.

### ANZEGEM. LA JUNA ESPERO.

Antaŭ du monatoj fondiĝis nia grupeto, kaj de post tiam ni regule kunvenas ĉiujn dekkvar tagojn. Kvankam ne ĉiuj regule ĉeestas niajn perfektigajn vesperojn ni tamen ĉiam havas kontentigan nom-

bron da geĉeestantoj, kiuj laboras kaj perfektigas sin en la movado

De nun nia programo regule aperos en nia monata organo, kaj ni esperas ke ĉiuj gemembroj atentos ĝin por ke ili kunlaboru al la disvastigo de la Zamenhofa lingvo en nia regiono. Ĉi-tie sekvas la punktojn pritaktotajn dum la monato de Septembro.

La 6an kaj 13an libertempo okaze de la kermeso.

La 20an : aranĝoj por la estonta Cseh-kurso. Ĉiu kunhelpu por ke ni havu denove kontentigan nombron da gepartoprenantoj.

La 27an : perfektiga vespero dum kiu ni ripetos la malfaci — laĵojn, kiuj aperas dum la konversacio. Ni atendas ĉiujn senescepte !

### ARENDAK. LA VERDA KAMPINA STELO.

La 1an de Aŭgusto nia sekcio havis la honoron, inviti la esperantistojn el la ĉirkaŭaĵo en REGIONA KUNVENO.

Jam la antaŭan vesperon alvenis 8 Antverpenaj gesamideanoj, kaj en amika rondo nia klubejo kunigis nian ageman prezidanton (kiu jam dum la tuta semajno sin dediĉis esti, por la familia tendo, la kuriozaĵo por la Arendonk' aj vilaĝanoj), la ok veteranojn kaj kelkajn fervorajn membrojn de nia novfondita sekcio. Dum kanto kaj ŝerco la horoj rapide forpasis.

Dimanĉo estis la maltrankvile atendata, solena tago. Ek de la 10a. antaŭtagmeze, per ĉiuj vojoj alvenis verdstelumitaj bicikloj kaj

« la nepra propagandilo  
de Van As l'aŭtomobilo »

memkompreneble ne mankis. Aliaj Antverpenanoj, konataj vizagoj el Mol, Herentals, Geel, Turnhout... plenplena baldaŭ estis nia klubejo. Denove kantoj rakontoj, ŝercoj kaj interbabilado kreis la amikecan atmosferon kiu karakterizas esperantistajn kunvenojn. Tro-rapide forflugas la tempo en tiel agrabla kunesto. Sed ankaŭ esperantistaj sternaĵoj ne nutras sin per idealoj...

Posttagmeze pliaj alvenitoj : la klubejo eĉ ne plu eblas enteni la duonon de la ĉeestantoj. Sed ne gravas, la vetero delogas, kaj je la 1 1/ a. impona grupo donas en la stratoj de Arendonk kvazaŭ demonstracion poresperantan. La flagetoj flirtas sur la feraj ĉevaloj, kaj tra la mirinde bela kampino biciklas la pacaj kavaliroj de la Zamenhofa idealo kaj resonadigas erikejojn kaj abiarbarojn de entuziasmaj kantoj... Postel ! La celo de la ekskurso. Kaŝita en la verda ĉirkaŭaĵo subite aperas la antikva abatejo. Sed la kruroj laciĝis kaj sekigiis la gorĝoj. Glaseton da freŝa biero en « De Klok » inter la ĉirkaŭmuroj de la monaĥejo, kaj allogas nin la ekspozicio de pentraĵoj en la salonoj de la abatejo. Ankoraŭ aliaj verdsteluloj tie : el Nederlando. En la preĝejo, la diservo ankoraŭ daŭras kaj nia pia gvidonto malfruas. Fine venas bonhumora frato kiu jam komencos la gvidadon, poste anstataŭigos lin monaĥo kiu kondukas nin tra la salonoj kaj koridoroj de la bela konstruaĵo, montras al ni la antikvajn valoraĵojn, pentraĵojn, artaĵojn, klarigas datojn kaj detalojn. Precipe la altvalora biblioteko kun malnovaj manuskriptoj estis inda je vizitado. Malfeliĉe, kaj je granda indigno de la samideaninoj, ne ĉiujn la ĉambrojn povis malsanktigi la piedetoj de



niaj virinaj kunulinoj. Rekompence, ili ŝatis la favoron admiri kolekton da poŝtmarkoj kiuj, laŭŝajne, ekdezirigus ĉiujn filatelistojn. Ne ankoraŭ forpasis la tutan tagon, kaj ĉiproksime kuŝas bela lago. Tien ! Ripozo, remado, kaj eĉ kelkaj ne povis rezisti al loganta akvo kaj profitas de mallonga, refreŝiginta bano.

Tamen venas la tempo por adiaŭi. Longa vojo atendas ankoraŭ por multaj. Denove flirtas la flagetoj en ĉiuj direktoj : Antverpeno, Mol, Geel, Herentals, Turnhout, Veldhoven, Arendonk.

Gis la revido samideanoj, en Antverpeno la sekvontan monaton !

### *BRUGGE. PACO KAJ JUSTECO.*

Tre agrabla tago estis la dimanĉo dum kiu nu iris al la dunoj de Breedene. Malmultnombraj estis la partoprenantoj. Kial ? El Oostende ankaŭ venis nur du. Kaj la fraŭlinon el Blankenberge ni maltrafis. Bedaŭrinde. Pro nia kulpo, ni devas konfesi. Ni bonege amuziĝis. Ĉiuj sportoj, aŭ preskaŭ, estis praktikataj, luktado, pilkjetado, rondancado, manĝado. Kaj ĉiu sporto havis sian heroon. Jes, ankaŭ la manĝado havis ĉe ni sian heroon. La postsigno de tiu ekskurso vidigis en la sekvonta kunveno dum kiu ni refoje dancis la sepan salton, kiu estas ĉiam speciala surprizo esti terure subpremata. okazo, sovaĝa ribeliĝado de Carman devis esti terure subpremata. Sed kelkaj membroj sekrete pensis pri vojaĝo. Tio okazis, i.a. al niaj nordaj sampopolanoj. Ankoraŭ malpli da ĉeestado en la kunveno sekvis. Tamen ili ne estis malinteresaj. Starigo de dokumentarservo estis decidita. Regule ni nun havas deklamadon de kamarado Roger. Sed la lasta kunveno ! ho ve ! tiom estis forvojaĝintaj aŭ... ? ke nur du venis. Tiuj du plej fidelaj meritas mención tie-ĉi : ili estas la subskribinto kaj Karel van Coillie (legu « La nekonata soldato »). Ĉu tio ne meritas premion ? Kion vi pensas kasistino ? Baldaŭ ni devos ree kunveni en la ejo, je la oka vespere, ĉu ĉiuj venus ? Ni komencis ankaŭ la preparan laboron por la venonta Cseh-kurso. Sed ni ĉiuj konsciis ke vere nur la persona propagando bone efikas. Multajn kaj bonajn geanojn ni devas varbi. Pezaj ŝarĝoj estos metataj sur niaj ŝultroj. Fina vorto : laŭ kvanta vidpunkto Esperanto gajnas multajn adeptojn. Laŭ kvalita vidpunkto ? Certe ankaŭ. En tiu lasta senco ni devas havi honorlokon. La aliaj ne rajtu diri pri ni ke ni ĉion, escepte Esperanton. Ni iĝu ĉiuj kapablaj flue paroli nian karan lingvon. Ĉiu kiel eble plej multe parolu.

### *BRUSSEL. « N.E.L.E. ».*

Gedurende de drukste zomermaanden (Juli, Augustus) vergaderen we slechts eenmaal om de maand. Op Donderdag 5de Oogst j.l. werd onze bijeenkomst door de getrouwsten bijgewoond. Na inzage van de ingekomen brieven en drukwerken, en de laatste schikkingen werden getroffen voor de deelname aan onze jaarlijksche IJzerbedevaart, hadden we het genoeg een sam-ideanino uit Tallinn, hoofdstad van Estonië, in ons midden te krijgen. Bij een genoeglijk kouten over de Esperanto-beweging bij haar en bij ons, en met wat een gemak we elkander verstonden en begrepen, was wel het zooveelste bewijs, dat Esperanto wel degelijk de internationale taal bij uitnemendheid is. Bij late uur werd onze vergadering gegeven, met

oproep dat we vanaf 2de September a.s. onze werking regelmatig en wekelijks hernemen.

#### *OUDENAARDE. AL PACO.*

Ni speciale alvokas niajn gegrupanojn por ĉeesti la kunvenojn dum tiu — ĉi monato. Jenajn punktojn troviĝas sur la programo.

La 7an okaze de la kermeso ni ne kunvenos.

La 14an: komuna priparolado de la organizota propagando por nia estonta Cseh-kurson. Ni devas superi la antaŭan kurson.

La 21an: ni havos perfektigan lecionon. Dum tiu kunveno ni speciale pritraktos la konversacion ĉiutagan, por ke ni lernu bone elparoli la Zamenhofan lingvon.

La 28an debatvespero pri esperanto.

Do, karaj geamikoj, faru vian eblon por ke vi de nun regule ĉeestu niajn interesajn vesperojn kiuj ne estas multnombraj, sed tiel necesaj por vi. Vi certe trovos la necesan tempon, nun ke la longaj vesperoj alproksi miĝas, por perfektigi vin en la uzado de nia kara mondlingvo.

#### *RONSE. « LA PACA STELO ».*

La monato de Septembro estu laborega monato. Ni ripete pridiskutos la intensan propogandmanieron por nia estonta Cseh-kurso. La dekkvinan de Septembro estos dediĉata speciale al tiu por ni ĉiuj tre grava temo. Ni atendas tiun vesperon grandan ĉeestantaron kaj tiam al la laboro kun tutnova kuraĝo.

Ciu komprenu sian devon. Ne ekzistu pasivuloj. De la unua ĝis la lasta membro, ni faras gravan alvokon por ke ili alportu almenaŭ 2 novajn elementojn.

Sukceso aŭ malsukceso estos disvastigata pere de F.E. sub tiu-ĉi rubriko.

La nura ordono estu: 50 novaj membroj por la kurso kaj 100 membroj por la nova jaro.

#### *VICHTE.*

Sub influo de la somero kaj libertemtagoj de niaj « geinstruitoj », la grupvivo iris « pianisimo » dum la pasinta monato de aŭgusto. Dum la ĝenerala kunveno la ĉeestantoj tiam ankaŭ pli ŝatas la « sporton » ol la lernado. Damage ke la ludantoj perdis tiel ofte la piedpilkon. Tamen la bona sezono por la studado revenos baldaŭ, kaj jam de la venonta monato la agrablaj vesperoj. Pro tio ankaŭ ni atendos en la ĝenerala kunveno de la 7a de septembro, en nia kutima ejo, la plej grandan parton de niaj membroj. La programo estos certe interesa, la « sovjet » estraro preparos surprizon al la sovjetanoj. Ni esperas je la ĉeesto de ĉiuj membroj.

La turistoj de nia grupo tamen ne forgesis la ekskurson dum la monato, kaj sesope ni partoprenis al la kolektiva vizito de la stando en la komerca foiro de Kortrejko. Por la venonta vintro, la loka grupo ne intencos organizi kurson, sed forte kunlabori al la organizo de la lecionoj en Waregem kaj Harelbeke, proksimaj lokoj. Jam de nun la semajna gazeto « DE VREDE », el Waregem, malfermis Esperantan rubrikon, kiu certe estos bona propagando por la nova kurso.

# Angulo de la Sercemuloj

*Solvo de problemo 28 (36 P.)*

**HOR.** : Hipoglosa — balen — alarm — alo — orm — nei — ro — lb — pp — la — mir — iom — ag — minor — ja — ran — kon — nud — legomo — sup.

**VERT.** : Barbar — halo — gal — ilo — ne — pe — lim — onobriko — nom — lampiono — ol — por — san — nu — orel — jup — miaŭad.

*Solvo de problemo 29 (4 P.)*

Araneo — batali — ananas — melaso.

PREMION gajnis : So Van As.

JARBATALO. Fino V. D. Mast kaj Sro K. Pollet estas ĉiam kune kun 223 poentoj !

## NOVAJ PROBLEMOJ

*Atentu !!* En la Aŭgusta numero de FL. E. ne aperis problemo 31 ĉar la presejo ne havis la necesan kliŝon. Kaj, ĉar ankaŭ en problemo 30 enpenetris eraron, ni forfaligos ankaŭ ĉi-tiun problemon. Tamen por rekompenci la solvistojn, ni aperigas ĉi-tiun monaton kvar problemojn. Por ĉiu problemo ni forlotumos unu premion. 8/10 ajn de la poentoj donas partoprenrajton al la lotumado. La solvo estu sendataj rekte al Sro F. VOLDERS, *Bredastraat, 94, Antwerpen*. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. Ĉiuj al la laboro !!


### PROBLEMO 31 KRUCVORTO (64 P)

**HOR.** :

- 1) Grandskale aĉeti (R) — malpliigo de prezo.
- 2) Tempo de la okazaĵo — trompiĝi (R).
- 3) Prepozicio — radiko — maldekstre (en politiko) (R) — muziknoto.
- 4) Familiano (R) — ĥemia elemento — hejma mamulo (R).
- 5) Ekskrementa likvaĵo (R) — adverbo — granda fiŝhejmo.
- 6) Mortiga infekta malsano — voli — envii (R).
- 7) Sama (R) — mezgrada lernejo (R).
- 8) Impona — ceremonia (R) — retransigi en difinita loko (R).
- 9) Ege ami (R) — aro da ligitaj objektoj (R) — parto de preĝejo.
- 10) Iam (R) taksita prezo de io (R) — treni (R).
- 11) Marŝi (R) — veturilo (R) — tro alta.
- 12) Katenu — diaĵo (R).
- 13) Armea estro (R) — Agado por montri amon aŭ respekton.

**VERT.** :

- 1) Certigi (R) — juvelŝtono.
- 2) Sola — Parfumo (R).
- 3) Sufikso — rabobestetoj — pron. pers.
- 4) Duo (R) — riverego en Afriko (R) — sinsekvo (R).
- 5) Ekbatali, ekbati (R) — la tri literoj de ano — sencele iri de loko al loko.
- 6) Mordetadi (R) — dekrura gustaco (R).
- 7) Parto de la maldika intesto (R) — intermonta malalta vastaĵo.
- 8) Reagi por montri amon (R) — duaordo kurbo (R).




- 9) Papago — paroli (R) — nacia sciigilo (R) (certa linio en cirklo).  
 10) Dancfesto (R) — ŝirmulo de saĝuloj kaj artistoj (R) — matena gluto sur vegetaĵoj (R).  
 11) Kolekto (R) — arkaĵa subtera xambro en fortikaĵo (R) artikolo.  
 12) Efektivigi, agi iamaniere — peni ne renkonti iun (R).  
 13) Publika paroladisto (R) — korpparto.

PROBLEMO 32 LITERENIGMO (23 P)

- |                                 |                                |
|---------------------------------|--------------------------------|
| 14, 9, 11, 4, 20, 16            | Flandra grupo esperantista (R) |
| 8, 3, 14, 6, 11, 10, 16, 12, 21 | » » » (R)                      |
| 18, 11, 6, 5, 17, 13, 22, 15, 2 | » » » (R)                      |
| 6, 11, 15, 8, 23, 4, 5          | » » » (R)                      |
| 2, 7, 12, 13, 19, 11, 19        | » » » (R)                      |

La tuta frazo enhavas 23 literojn kaj nomigas esperanto-unuigo.

PROBLEMO 33 VETKURO (5 P)



Policano kiu troviĝas en A, volas kapti ŝteliston kiu sin trovas en la momento en B. Ili ĉiam kuras ĉirkaŭ la kvarangula lageto, kiun devas prezenti la desegnaĵo. La konturo de la lageto estas 80 m. La policano povas ĉirkaŭkuri ĝin en 30 sekundoj kaj la ŝtelisto en 40. Kiom da fojoj devas ĉirkaŭkuri la policano la lageton por kapti la ŝteliston?

PROBLEMO 34 ENIGMO (5 P)

Malplenigita barelo pezas 30 kilogramojn (sen kovrilo). Per kio oni devas plenigi ĝin, por ke ĝi pezu nur 20 kilogramojn?!

---

---

## **FLANDRA LIGO ESPERANTISTA** **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

**Voorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.  
**Ondervoorzitter:** E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.  
**Sekretaris:** Gerard Debouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.  
**Penningmeester:** Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.  
**Propaganda:** Gerard Lenaers, Willemstraat, 22, Hamme (O. Vl.).  
**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.  
**Lidmaatschap:** 5 fr.; met maandblad: 25 fr.  
**Postchek:** Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50

### **AFDEELINGEN:**

**Aalst:** « Pioniro ». Sekretariaat: Molenstraat, 30.  
**Aarschot:** « La Progreso ». Sekretariaat: Fabriekstraat, 28.  
**Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esp-ista ». Sekr.: Stefaniestraat, 44.  
**Anzegem:** « La Juna Espero ». Sekretariaat: Statiestraat, 38.  
**Arendonk:** « La Verda Kampina Stelo ». Sekretariaat: Schotelven, 4.  
**Blankenberge:** « Norda Stelo ». Sekretariaat: Koninginnelaan, 18.  
**Brugge:** « Paco kaj Justeco ». Sekretariaat: Guido Gezellelaan, 15.  
**Brussel:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. Van Humbeekstr., 3.  
**Deinze:** « Deinza Esperanto-Klubo » (D.E.K.). Sekretariaat: Dorp, 54, Astene.  
**Diksmuide:** « Grupo Zamenhof ». Sekretariaat: Maria Doolaeghstraat, 36.  
**Gent:** « Roeland ». Sekretariaat: Rasphuisstraat, 5.  
**Kortemark:** « Eta semo povas kreski ». Sekretariaat: Statiestraat, 23.  
**Kortrijk:** « Esperantista Grupo ». Sekretariaat: Moeskroenstraat, 11.  
**Lebbeke:** « Vasta Horizonte ». Sekretariaat: Stationstraat, 87.  
**Leuven:** « La Nova Tagiĝo ». Sekretariaat: Broekstraat, 21, Heverlee.  
**Lichtervelde:** « La Tagiĝo ». Sekretariaat: Weststraat, 47.  
**Mechelen:** « La Estonto ». Sekretariaat: Vekestraat, 25.  
**Oostende:** « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Stw. op Torhout, 150.  
**Oudenaarde:** « Al Paco ». Sekretariaat: Nederstraat, 8.  
**Roeselare:** « Ruselara Esperantista Grupo ». Sekr.: Hoogledesteenweg, 163-165.  
**Staden:** « Nia Grupeto ». Sekr.: (M. Vandamme). Vijfwegen.  
**Tienen:** « Zamenhofs Standardo ». Sekretariaat: Bruulstraat, Kumplich.  
**Torhout:** « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Boomgaardstraat, 4.  
**Vichte:** « La Frateco ». Sekretariaat: Harelbekestraat, 29-a.  
**Vilvoorde:** « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Marius Duchéstraat, 45.  
**Wervik:** « Fratiĝo ». Sekretariaat: Brugstraat, 9.  
**Wevelgem:** « Per Esperanto al Mondpaco ». Sekr.: Papenstraat, 54.  
**Woumen:** « Veni, Vidi, Venki » (V.V.V.). Sekretariaat: (Rom. Vandepoele).  
**Zaventem:** « Verda Standardo ». Sekretariaat: Heldenplaats, 115.  
**Zwevegem:** « Paco per Esperanto ». Sekretariaat: Ootegemstraat, 71.

### **VERTEGENWOORDIGERS:**

**Assche (Brab.):** L. De Rop, Tenberg, 24.  
**Deerlijk:** Fr. Benoit, Kapellestraat, 7.  
**Hamme (Vl.):** G. Lenaers, Willemstraat, 22.  
**Harelbeke:** A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.  
**Mol:** L. Claeys, Kapellestraat, 3.  
**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.  
**Ronse:** G. De Boes, Wijnstraat, 81.  
**Sint-Truiden:** G. Mathijs, Steenweg op Hasselt, 55.  
**Tielt:** R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.

---

---

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas:

# **FLANDRA LIGO ESPERANTISTA !**

---

---

OSTENDO

## HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

Sano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

### DRUKKERIJ

★

Aŭtomata Presejo

## H. BRAEKEVELT


Statedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversoj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.



Proksime de la naĝejo (200 m.).

« Presejo Grootte Centrale Drukkerijen », Lange Loza lastraat, 181, Antwerpen.

## “BREUGHEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

## LUOTA

## Café “Nieuwe Carnot”

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj manĝaĵoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo.

## St MARIABURG

10 KM. DE ANTVERPENO

## Grand Hotel de la Chapelle

lokita en arbarĉirkaŭaĵo  
ĉia moderna komforto — aŭtomobilejo  
laŭteniso — infanludejo — teraso

Restoracio — Familia pensio

N.B. - Elektita loko por ekskursaj celoj  
Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

Wwe VAN HAVER-DE BOES